

12740 Bariero por bari la tutan larĝon de ŝoseo.

angla full barrier franca barrière complete germana Vollschranke

Tri terminproponoj:

- 1) bariero totala
- 2) bariero totalbara
- 3) bariero tutbara

PIV klarigas: totala Ĉion ampleksanta, ĉioma.

tuta Tia, ke ĝi entenas ĉiujn siajn partojn sen escepto aŭ manko.

Ekspliko.

La nocio ĝis nun mankis kompare kun ĝenerala „bariero” 00761 kaj „duonbariero” 02490. Necesas substreki, ke bariero 12740 povas konsisti

- aŭ el unusola barietrabo (05120) longa laŭ ŝoseolarĝo,
- aŭ el du kuplitaj barietraboj (00767) longaj nur laŭ parto de ŝoseolarĝo.

Lastkaze ni diferencigu inter ĉi tiu speco de bariero 12740 kaj duoblaj duonbarieroj (02491) kiuj ne estas kuplitaj. Ĉe pasejo traknivela kun duoblaj duonbarieroj (12742) estas barata ankaŭ la tuta larĝo de ŝoseo, sed pro funkciigo per trajnalproksimiĝo malleviĝas komence nur la duonbariero-paro je alira flanko, poste la paro je deira flanko. Sekve bariero 12740 estu instalata nur ĉe gardata traknivela pasejo (06125). La UIC-difinoj 12740 kaj 12742 ne mencias tiun diferencon, do ne estas sufiĉe klare vortigitaj.



Gardata traknivela pasejo kun unusola barietrabo

Terminara Kuriero

TeKu 134

Aŭgusto 2008

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablenail.de

Karaj gekolegoj,

bonvolu pardoni, ke ĉi tiu kuriero aperas tiom malfrue. Dum lastaj monatoj mi streĉe agis por venki problemojn kaŭzitaĵn de perturboj en datumbanka programaro. Bedaŭrinde mi devis forviŝi dosierojn kun ĉiuj enigoj dum 2007 (de ili ĉirkaŭ 700 difintekstoj). Por daŭrigi la enigadon necesis uzi dosierojn el novembro 2006.


Intertempe sukcesis senprobleme enigi la terminojn (de ili 229 novajn) laŭ aktuala laborrezulto. Sed pro restanta perturb-danĝero mi ankoraŭ devas rezigni pri enigo de difinoj. Laŭ miaj listoj 918 tradukitaj difintekstoj atendas sian enigon, dum 401 tekstoj troviĝas en la datumbanko en Parizo.

Heinz Hoffmann

Kongresrezultoj en Poznań

Prepare la kongreson klariĝis jenaj terminoj:

06632	signalilpozicio plej restriktaj	laŭ TeKu 132, paĝo 4
08244	signal-sekuriga sistemo	laŭ TeKu 131, paĝo 4
12999	signalo loke plenumenda	laŭ TeKu 133, paĝo 6
Dum la kunsidoj estis decidataj jenaj terminoj:		
00795	trajnsinsekvo egale vetura	laŭ TeKu 132, paĝo 5
01035	branĉvojo (en trakforko)	laŭ TeKu 133, paĝo 5
01036	trunkvojo (en trakforko)	laŭ TeKu 133, paĝo 6
01978	kontaktilo ripozferma (relajso)	laŭ TeKu 133, paĝo 3
01983	kontaktilo kurentferma (relajso)	laŭ TeKu 133, paĝo 3
04183	stacio landlima trajntransprena	laŭ TeKu 132, paĝo 6
05003	substitua funkciigo	laŭ TeKu 131, paĝo 2
05226	lokomotivo helppuŝada	laŭ TeKu 133, paĝo 3
05229	lokomotivo trajnfina nepuŝada	laŭ TeKu 133, paĝo 4
05928	ruliĝekipajo	nova
08094	servo veturiga	laŭ TeKu 132, paĝo 6
08196	limsigno trakokonverĝa	laŭ TeKu 132, paĝo 5
12902	bremsadregulilo aŭtomate ŝarĝ-adapta	laŭ TeKu 133, paĝo 5
12924	trakforko eksteren kurba	laŭ TeKu 133, paĝo 5
12925	trakforko internen kurba	laŭ TeKu 133, paĝo 5
12967	ŝarĝlimtabelo (varvagono)	laŭ TeKu 133, paĝo 6



Kongresanoj rigardas la centran regejon en ĉefstacio de Poznań

Pri la nocio 12750 laŭ TeKu 133, paĝo 4 (aparato ĉe trako, kiu transsendas datumojn al trajno, por aktualiĝi la aŭtomatajn sekurecinstalaĵojn ĉe veturilo) la partoprenintoj havis malsamajn opiniojn, ĉu

- a) elekti la terminon **trakanteno** laŭ angla *track antenna* (unuavice en *RailLexic*) kaj germana *Gleisanterne* (duavice en *RailLexic*) aŭ
- b) krei neologismon **balizo** laŭ nacilingva *balise* / *Balise* (en *RailLexic* triavice ĉe angla, sole ĉe franca kaj unuavice ĉe germana).

Ĉefa argumento por solvo a) estas ties PIV-konformeco. Leganto de fakteksto kun „trakanteno” trovas

- en PIV la klarigitajn nociojn „trako” kaj „anteno”,
- en *RailLexic* la difinon de „trakanteno” kaj la naciajn tradukojn kiel „*balise*”.

Ĉefa argumento por solvo b) estas ties ekzisto ekster en la tri menciitaj faklingvoj ankaŭ en la dana, kroata kaj certe multaj aliaj. *Sonja Amariglio* (FR) informis, ke la franca *balise* ĝenerale nomas aranĝon mekanikan, optikan, sonoratan aŭ radioelektran por signali danĝeron ktp. Laŭ Vikipedio ĝi estas uzata ĉe informadiko, navigado, aeronaŭtiko, sporto kaj fervojo. Eĉ frukto *balise* ekzistas.

Ĉe solvo b) gravas, ke okaze de sekva PIV-revizio (kiom???) ni konvinku la redaktejon de PIV pri graveco de kreita neologismo, por atingi interkonsenton. Ĉu la responsuloj akceptus tiun tre specialan neologismon?

Ni decidu pri 12750 aŭ per reta korespondado aŭ en sekva IFEF-kongreso.

Kelkaj novaj taskoj

Tre similaj nocioj estas 11477 kaj 11478. La termino „rapidoregulado” (11477) gramatike ne estas ekzakta.

11477 Adaptado de momenta veturilrapido al la donita loka rapidosinsekvo dum observado de la rapido malgraŭ ĝenoj (dekliveco, vento).

ĉeĥa	<i>regulace rychlosti</i>	itala	<i>controllo automatico della velocità</i>
dana	<i>automatisk hastighedskontrol</i>		
franca	<i>régulation de vitesse</i>	pola	<i>regulacja prędkości</i>
germana	<i>Geschwindigkeitsregelung</i>	rumana	<i>control automat de viteză</i>
hungara	<i>sebesség szabályozás</i>		

Unu ŝanĝpropono: **rapidoreguligo**

11478 Metodo aŭ aranĝo por observi la donitan normrapidon en apartenanta tolerospaco.

ĉeĥa	<i>řízení rychlosti</i>	franca	<i>commande de vitesse</i>
dana	<i>hastighedskontrol</i>	itala	<i>comando della velocità</i>
germana	<i>Geschwindigkeitssteuerung</i>	pola	<i>sterowanie prędkości</i>
hungara	<i>automatikus sebességvezérlés</i>	rumana	<i>control de viteză</i>

Tri terminproponoj:

- 1) **rapidoregado** = ĝisnuna termino
- 2) **rapidoregadmetodo**
- 3) **rapidoreguligmetodo**

PIV klarigas: **regi 6** Direkti la funkciadon de maŝino.
reguligi 1 Konformigi al ia regulo.

En la nunjare nove enigitaj nocioj troviĝas ankaŭ jenaj tri pridiskutindaj:

12724 Aparato por transformi manipulojn de regejestro en taŭgajn enirsignalojn por komputila regejo, kaj ankaŭ por indiki al la regejestro la stacion de sia regejzono.

angla	<i>panel multiplexer</i>
franca	<i>multiplexeur de tableau de commande et de contrôle</i>
germana	<i>Bedienfeldmultiplexer</i>

Du terminproponoj:

- 1) **plektilo regtabula (komputila regejo)** = ĝisnuna termino laŭ 10504, 10971
- 2) **transformilo regtabula (komputila regejo)**

PIV klarigas: **plekti 3** Kombini plurajn signalojn, por sendi ilin per unu komunika kanalo.

multipleksoro = plektilo.

12736 Sistemo subtenata per komputilo, en kiu estas storita la taga deĵora horaro, kaj kiu donas informojn al la aŭtomata trajnrega instalaĵo, por ke tiu povas optimumigi trajnveturojn.

angla	<i>timetable processor</i>
franca	<i>module fichier horaire</i>
germana	<i>Fahrplanmodul</i>

Du terminproponoj:

- 1) **horarprocesoro** = ĝisnuna termino
- 2) **trajnoptimumiga sistemo**

PIV klarigas: **procesoro** Parto de komputilo, kiu prilaboras datenojn kaj ĝenerale ankaŭ interpretas maŝinlingvajn instrukciojn.